

Oficiala Organo de Kuba Esperanto-Asocio


Enhavo

- | | |
|--|----|
| ☞ <i>En urbo senpaŭza</i>
<i>Maritza Gutiérrez</i> | 3 |
| ☞ <i>La estonteco promesplenas</i>
<i>Julián Hernández</i> | 4 |
| ☞ <i>Agu, ne plendu</i>
<i>Manuel Rodríguez</i> | 5 |
| ☞ <i>Pri Esperanto plurmedie</i>
<i>La Redaktoro</i> | 6 |
| ☞ <i>SAEST</i>
<i>Carmen Aleida Hernández</i> | 7 |
| ☞ <i>Pri Yumeiho kaj Esperanto</i>
<i>La Redaktoro</i> | 8 |
| ☞ <i>Meditoj priesperanta</i>
<i>Juan Lázaro Besada</i> | 10 |
| ☞ <i>Villa Clara alrigardas la Komitatkunskidon</i>
<i>Marta Alonso</i> | |
| ☞ <i>9-a Nacia Seminario por infanoj</i>
<i>La Redaktoro</i> | |
| ☞ <i>Mesaĝo el Japanio</i>
<i>La Redaktoro</i> | 14 |
| ☞ <i>Klopodu ne gliiti</i>
<i>Grumblulo</i> | 15 |
| ☞ <i>La angulo de la dubo</i>
<i>PIVulo</i> | 16 |



Estimataj:


Jen speciale sukplena numero, ĉar oni ĵus okazigis plian Seminarion pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, festis la 21-an datrevenon de nia asocio, la instruistoj denove seminariis, aperas intervjuo al fakdelegito pri Yumeiho, el Japanio etendiĝas amika mano, Julián raportas pri la Infana Renkontiĝo, nia prezidantino informas pri la UK en Israelo, kelkaj grumblas, aliaj konsilas, kaj... uf, ĉu ne estus pli bone, ke Vi mem legu?



Via Redaktoro,

Lic. Alberto García Fumero

Nia Kovrilo: Marta Alonso, estraranino pri Financoj, antaŭ la monumento al la Majstro, en la urbo Fortaleza, Brazilo.



XI-a jaro, nro.4 2/2000, (maj.-aŭg.) Aperas 3 foje jare (aprilo, aŭgusto kaj decembro) / Eldonas: Kuba Esperanto-Asocio / PF.: 5120; 10500 Havano, Kubo / Telefonnumeroj: 401364 kaj 404484 / Faksno: 53 7 33 8729 / Retadreso: kubesp@ip.etecsa.cu / Ĉefredaktoro: Alberto García Fumero / Revizio k. korektado: Maritza Gutiérrez / Komputila kaj grafika aranĝo: Alberto García Fumero / Prezo: 1:00 CUP (enl.), 2.00 NLG aŭ 2 irk. (eksterl.), pagendaj al KEA-konto ĉe UEA: keaux-u / Ĉiuj rajtoj rezervitaj / Reproduktado permesata (indiki fonton k. sendi 2 ekz. al la Redakcio).

NACIA ESTRARO

***Maritza Gutiérrez González**
Prez.. Atentas plenumon de ĉiuj taskoj kaj fakoj.

***Juan Ramón Rodríguez Gómez**
Ĝenerala Sekr.. Kontrolas internan agadon./Historio, Ameriko, Avanco, La Noktuo kaj Universo

***Martha Alonso Gutiérrez**
Financoj./Resp.pri administraj aferoj

***Alberto García Fumero**
Informado./Hejmpaĝo

***Pedro Fernández Rodríguez**
Kulturo, Zorgas pri artaj k. klerigaj aranĝoj./Biblioteko

***Héctor Jiménez Batista**
Instruado k. ILEI-Sekcio.

***Manuel Rodríguez Rábago**
Internaciaj kaj Publikaj Rilatoj.

Komisiitoj


***Roberto Torres Alvarez**
Atento al alilandaj e-istoj.

***Juan Lázaro Besada Toledo**
Atento al verkistoj.

***Carmen A. Hernández Socarrás**
Faka Agado

En urbo senpaŭza...

Inter la 25^a de julio kaj la 1^a de aŭgusto ĉi la 85an UK-on de Esperanto kiu okazis en la Avivo en Israelo.



jare mi partoprenis
urbo Tel

Temis pri unika sperto kiu donis al mi la raran emocijon esti unu el malmultaj kubaj civitanoj kiu vizitas tiun landon de konfliktoj kaj miljaran historion, lando kie naskiĝis tri grandaj religioj de la homaro, lando de elmigrintoj kaj senpaŭza, kiel atestas la taga kaj nokta vivo de la pasantoj tra la bela stranda marbordo plena je modernaj hoteloj kaj turistoj. Je malmultaj metroj ankaŭ troveblas pli modestaj domoj kaj kvartaloj, granda merkato kaj restoracietoj alilandaj. En tiu urbo sesiis la 85^a UK-o, kiu arigis ĉirkaŭ 1200 esperantistoj el 61 landoj en hotelo-konferencejo Dan Panorama fronte al Mediteraneo.

Kiel tradicie en la kongresa programo okazis la interkona vespero, inaŭgura ceremonio kie oni legis mesaĝojn de Kofi Anan, ĝenerala sekretario de UN kaj de la ĝenerala direktoro de Unesko. La prezidanto de UEA, Kep Enderby malfermis la kongreson kaj salutantoj el landaj asocioj bondeziris la kongreson. Dum tuta semajno oni havis la eblecon ĝui la sesiojn de la kongresa universitato per prelegoj de Humphrey Tonkin kaj Amri Wandel; okazis interesaj prelegoj pri la juda temo, pri esperantologio kaj aliaj. Kiel kutime sesiis la diversaj fakaj kunsidoj pri matematiko, virinoj, medicino, komunistoj kaj aliaj. La tago de la lernejo dediĉis sian temon al la projekto Interkulturo de ILEI/UEA, pri la belartaj konkursoj ankaŭ estis disdono de premioj. La vesperoj ofertis al kongresanoj Nacian Vesperon, teatraĵojn de Vida Jerman kaj kroata trupo, Internacian Vesperon kaj balon.

La komitatataj sesioj de la kongreso estis temporaba programero, kiu tamen estis tre grava pro tio ke en ĝi oni diskutis la estraran raporton de UEA, la finanĉan raporton, pri la eksteraj rilatoj, pri novaj honoraj membroj de UEA kaj aliaj kernaj temoj de la asocia vivo.

Alia ero kiu furoris en Israelo estis ekskursoj al plej gravaj lokoj kiaj Jerusalemo, Betleheno, Morta Maro, Groto Sorek kaj aliaj. Sendube unu el la allogaĵoj de la lando estis tiaj ekskursoj kiuj certe estis tre sukcesaj kaj multe ĝojigis kongresanojn. Vizito al Jerusalemo estis emocia momento por ĉiu kongresano kaj ankaŭ vizito al diversaj lokoj kie oni trovis gravuritajn religiajn tekstojn kiaj Patro Nia en Esperanto sub iniciato de IKUE.

La ĉijara UK-o estis sendube interesa kaj travivinda sperto kiu donis al esperantistoj la eblecon konatiĝi kun mezorienta lando kie la kongresa temo, Lingvoj kaj kulturo de paco montriĝis tiktla. Sen profundigi en politikaj temoj oni povas diri ke la elekto mem de la temo montris la volon de la kongresa lando pritrakti tiun aferon, sed ni povis konstati ke multon oni devas labori por atingi tiun celon, tamen, estas gratulinde ke ili strebis tion prezenti. La loka kongresa komitato multe laboris por ke la kongreso estu sukcesa, kaj mi persone spertis ilian afablecon kaj deziron tion realigi. Mi estas kontenta pri la rezulto kaj ĉiam memoros la Telavivan kongreson kiel emocian sperton.

Maritza Gutiérrez

La estonteco promesplenas

Infano

Kantoj, poemoj, dancoj, rakontoj kaj ridoj inondis la vendredan vesperon je la 14-a de julio. Ni estis en la Interkona Vespero de la Dua Nacia Infanrenkontiĝo de nia Asocio, kiu okazis en diversaj institucioj de la provinco Guantánamo, de la 14-a ĝis la 16-a de julio.

La entuziasmo kaj la talento de la kvardeko da infanoj partoprenantaj la renkontiĝon mirigis la ĉeestantojn kaj pli stimulis nian esperantistecon.

Sabate matene niaj karaj idoj memorigis nin pri nia historio kaj tradicioj pere de konkurso kaj artaĵoj. Postatgmeze kaj la infanoj kaj la plenkreskuloj distris sin en urbo naĝejo. Naĝeje ili kantis kaj ludis esperantlingve, kaj ricevis lotumitajn ludilojn.

La solena prezentado okazis vespere en la Kulturdomo, kaj malgraŭ la malfrua komenciĝo denove la feliĉuletoj kaj la ĉiamaj ludantoj plenigis la salonon per verdaj melodioj, versoj kaj dancpaŝoj. Oni premiis la plej elstarajn partoprenantojn, kaj ne nur ili fieris, sed ankaŭ ni kaj la gepatroj!

Dimanĉe matene la ĉeestantoj aŭskultis pri la historio kaj kulturo de kelkaj latinamerikaj landoj buŝe de la infanoj.


Sendube validas kaj valoras dediĉi tempon kaj malfermi spacon al la ludemaj malaltuloj, ĉar tiel bone ili semas la estontecon de nia Asocio.

Dankon al la laboristoj de la tieaj arta kaj speciala lernejoj, de la Pionira Palaco kaj de la Kulturdomo, kiuj per sia volonta laboro helpis al la bona organizo de la evento.

Dankon al la fratoj esperantistoj de tiu provinco, kiuj bone preparis ĉion kaj varmoplene gastigis nin ĝis la lasta momento.

Dankon al la infanoj el Guantánamo, Granma, Holguín, Urbo Havano kaj el Contramaestre, Santiago de Kubo.

Julián Hernández Angulo
Prezidanto de la Provinca Filio Urbo Havano



Agu, ne plendu!

Per tiu frazo mi iel omaĝas al Movado Sen Nomo, sed en vero mi uzas la sencon de la frapfrazo nur rilate al nia esperanta agado.

Multfoje oni diras, ke homoj estas eternaj komencantoj, ke ili bezonas pli bone lerni la historion de Esperanto, la ideon malantaŭ ĝi.

Plue oni diras, ke esperantistoj devus esti pli bone informitaj pri diversaj temoj, ĉar se ili ne estas informitaj, ili misinformos al ekstermovadaj instancoj kaj homoj.

Ĉu en niaj lernejoj oni faras, kion oni devas fari rilate al tio?
Ĉu niaj instruistoj estas sufiĉe bone preparitaj?

Laŭ opinio de elstaraj pedagogoj, instruisto nur kapablas transdoni parton de la sciojn al la lernantoj. La plimulto el niaj instruistoj multe laboras, sed se ili ne estas sufiĉe bone edukitaj, ili povos transdoni nur parton je parto de tio, kion ili konas, kaj se la lernanto siavice turniĝas en instruiston, la estontaj lernantoj eĉ malpli scios.


Estas vere, ke oni pretigas kurson por diplomitoj, kaj ke ili kelkfoje (ne ĉiam) partoprenas ilin. Sed vere ni ne povas perdi energion en tiaj kursoj, ĉar la rezulto ne estas tiom fruktodona kiom oni esperas. Preferinde estus enkorpiĝi tiujn gravajn informojn en la elementajn kursojn kaj ili fariĝus pli allogaj rilate al edukceloj, kaj jen kio vere interesas al ni.

Mi ne celas disputon, sed nur interŝanĝon je ideoj pri la temo, por ke ni kune serĉu strategion. Tiel eble ni ne plu plendos pri


tio, ke iu ne estas edukita en la esperantisma idearo.

Agu do ni por turni en atingeblajn niajn celojn.

*Manuel Orestes Rodríguez Rábago.
Estrarano pri Eksteraj kaj Publikaj
Rilatoj*



Pri Esperanto plurmedie



La 26-an de junio Kuba Esperanto-Asocio festis ĝian 21-an datrevenon. La ĉefaranĝo okazis en la sidejo de la Municipa Filio Centra Havano (ĉefurbe).

Dum kelkaj semajnoj, estraranoj kaj komisiitoj de KEA aperis en diversaj radiaj kaj televidprogramoj, kaj informis kaj pri la Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (SAEST) kaj pri la datreveno.

Inter ili:

D-ino Carmen Aleida Hernández, Komisiito pri Scienco kaj Tekniko, aperis en la naciskala radiostacio Radio Progreso (sama signifo en la internacia) dum disaŭdigo de la populara matena programo Juventud 2000 (Juneco 2000) la 23-an de majo, kaj diskonigis pri la Seminario.


La 9-an de junio, posttagmeze, la Ĝenerala Sekretario, S-ro Juan Ramón Rodríguez, informis ĉe la radiostacio Habana Radio, dum pli ol 15 minutoj.


Ankaŭ la Sekretario pri Informado, S-ro Alberto García Fumero, aperis denove la 25-an de majo je la naciskala televidprogramo TVeré (dum pinta horo!).

Ankaŭ, ree (jam estis la kvina fojo!) la kurtonda radioprogramo **Formalmente Informal** (Formale neformale) dediĉis siajn 18 minutojn al Eo, tiufoje al la 21-a datreveno de KEA.

De antaŭ tri jaroj, ĉiuj aperoj estas surbendigitaj.

Alberto García Fumero
Sekretario pri Informado





Plia Seminario SAEST
28-a (enskribiĝo kaj akcepto
partoprenantoj, el ili du
entute). Bedaŭrinde la serba
povis veni en Kubon, kaj oni
prelegon.



okazis de la 27-a ĝis la
la 26-an) de majo kun 52
eksterlandanoj (aliĝis 56
reprezentanto lasthore ne
devis laŭtlegi lian

La 25-an posttagmeze du hispanlingvaj prelegoj (Esperanto: Tutmondigo kaj Kulturo kaj Scienc-Teknika Informado en Eo) kaj tosto en la sidejo nacia de ACNU (Asocio Kuba de Unuiĝintaj Nacioj), ĝin malfermis.


Estis entute 33 prelegoj, 1 ronda tablo kaj oni ankaŭ prezentis 2 vidbendaĵojn. La temoj gamis disde medicino ĝis geografio, kun interesaj prelegoj pri filozofio (4), religio (3), komputado (4) kaj edukado (7).

Carmen Aleida Hernández Socarrás
Komisito pri Faka Agado

La 16-an de junio

Kuba Esperanto-Asocio

festis sian 21-jariĝon!



Pri Esperanto kaj Yumeiho en Kubo **Monetize**

Tempo fuĝas, kaj bezonatas finpretigi la bultenon... kiel preskaŭ ĉiam okazas al esperantaj bultenoj. Dum mi kolektadis materialojn, mi preskaŭ koliziis en la ŝtuparo kun S-ro Francisco Briel, fakdelegito pri Yumeiho kaj Direktoro de la Kariba kaj Sud-Amerika Areo ĉe Monda Yumeiho-Societo. Post la kompreneble necesa senkulpigo, mi kaptis la okazon (kompreneble, ĉu ne?) ĉe la gorgo kaj petis de li skizon pri la historio de Yumeiho kaj Esperanto en nia lando.

Jen la demandoj kaj la respondoj...

Demando: Kiam oni komencis paroli pri Yumeiho en Kubo?

Respondo: Dum la 75-a Universala Kongreso de Esperanto en Havano, d-ro Saionji faris elstaran prezenton de Yumeiho-terapio dum kelkaj tagoj. Oni vendis kelkajn librojn, kaj poste d-ro Saionji persone donacis librojn kaj eĉ vidbendojn. Li ankaŭ vizitis hospitalojn, ekzemple unu el la plej novaj, tiam rekonstruita kaj ampleksigita, la hospitalo «Miguel Enríquez» en la ĉefurbo. Tie li parolis kun la estrino de la fizioterapia fako, al kiu li donacis Yumeiho-libron kaj vidbendon.

Demando: Do, tiam oni komencis uzi la terapion tie...

Bedaŭrinde en tiu hospitalo post kelke da tempo oni ne daŭrigis la kuracadon pere de la Yumeiho-terapio.



Fine de aŭgusto, kelkajn tagojn post la 75-a UK, nia grupeto, kiu konsistis el José Llerandi, mia filo Fráncel kaj mi, komencis la lernadon de Yumeiĥo. Mi tradukis la librojn en la hispanan. Nia grupeto praktikadis senĉese, kaj du monatojn poste Llerandi daŭrigis la trejnadon de blinda terapiisto en la hospitalo «Miguel Enriquez».

Dum la jaroj 90 ĝis 94 ni praktikis Yumeiĥon kun familianoj, amikoj kaj eĉ labor-kolegoj. La plimulto el ili resaniĝis aŭ almenaŭ ilia sanstato pliboniĝis. Pro tio dum la jaro 1994 ni decidis malfermi kursojn en niaj kvartaloj «Camilo Cienfuegos» kaj «Alamar», ambaŭ en nia municipo Orienta Havano. Ni jam estis ricevintaj licencon kiel masaĝistoj.

Demando: Vi estas plurfoje partoprenintaj plurfoje en SAEST... ekde kiam?

En oktobro 1994 Fráncel kaj mi partoprenis la 9-an Forumo pri Scienco kaj Tekniko. Tie ni atingis la trian premion inter 143 esploroj. Nia esploro rilatis al la vertiĝ-sindromo ĉe homoj apartenantaj al la tiel nomata tria aĝo-grupo.

De tiam ni prezentas Yumeiĥon en la Seminarioj pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (SAEST), organizitaj de Kuba Esperanto-Asocio kaj ankaŭ dum ĉiu Nacia Kongreso de KEA. Dum tiuj eventoj ni kuracas la partoprenantojn. De tiam, ankaŭ, ni laboras profesie pri Yumeiĥo.

Dum la periodo 1994-2000 ni prelegis diversloke: en la Kulturdomo kaj la polikliniko de la municipo Alamar, en la ĉefurba Domo de la Studentoj, en la Kulturdomo de la Malnova Havano, en la Muzeo je la Insulestroj kaj ĉiuj eventoj de KEA.

Lastatempe ni surbendigis la 100 movojn de la terapio kiel leman helpilon. Ankaŭ ni strebis krei la landan sektion de MYS. Ene de KEA ni fondis grupon de Yumeiĥo por propagandi la terapion pere de prelegoj, demonstroj, ktp. Kuba Esperanto-Asocio apogis kaj apogas nin.

En aŭgusto 1995 mi fondis UNESKO-Yumeiĥo-Esperantoklubon, kiu ekzistis ĝis 1998. En tiu klubo ni prelegis pri Yumeiĥo kaj montris la terapion kaj ĝiajn rezultojn.

Demando: Vi estas lastatempe ricevintaj ian titolon aŭ gradon specifan pri Yumeiĥo, ĉu ne?

Respondo: En 1995 venis al Kubo nia kara amiko kaj instruisto Golamreza Azarhoushang, komisiito de D-ro Saionji. Li vizitis nian kuracejon kaj nian lernejon kaj konstatis nian laboron por kaj per Yumeiĥo. Tiam ni sukcesis atingi diplomon je la 2-a grado de Yumeiĥo.

En 1997 ni atingis la trigradan diplomon. Tiujare vizitis nin Tamiko Kawakami-Nielsen, kun kiu ni interŝanĝis spertojn. En 1999 ni atingis la 4-gradan diplomon

La Redaktoro

Meditoj priesperantaj

Defion fortulo akceptas
Se gvidas lin idealo
Ĉar la veron perceptas
Helan kiel kristalo.



Esperanton, nian torĉon
Portu ni ĉiam antaŭen
Vervo gvidu nian voĉon
La marŝo ĉiam avancen.

Batu kun fort' marmora
De nia kor' la tamburo
Ĉar la konsakro ora
Venkas ĉion. La muro

De defioj ignorantaj
Nenian nian vojon baru
Kreantoj esperantaj
Laboru, sed ne amaru!

Ekl al voj' de l' batalo
Sen timo, kun espero
Nin ne venkos fatalo
Nia celo estas nia fiero.

Kiom gravas la malico
Se nin gvidas ideo
Kontraŭ ĉia kaprico
La forto de nia kreo!

En mond' militskuata
Ni estas spark' de espero
La venko dezirata
De ni iras tra la tero.

La voĉo Zamenhofa
Supervivis genia
Gi vibras plene amoza
Pacama, fantazia.


Ĉi-vespere ni festas
Miraklon, ne nur KEAn
Ĉe ni la ĝojo nestas
Ni ĝuas la dolĉon krea.

Ni do, tostu ĝojmienaj
Per anima feliĉ'
En niaj koroj serenaj
Lumoj, ne superstiĉ'

La pacon ni konstruu
Per laborado nuna
Malamon ni detruu
Estu nia task' komuna.


La ŝipo de l' progreso
Estu nia ĉiama kanto
Ni krii sen ajna opreso
Antaŭen Esperanto!

*Juan Lázaro Besada Toledo
Havano, 2000.06.16*



Villa Clara alrigardas la Komitatkunsidon

Inter la 8-a kaj la 10-a de junio mi kontrolviziton al la provinco Villa Clara. tre miris pri la serioza kaj entuziasma preparlaboro de la esperantistaro cele al la okazigo de la venonta (la 18-an sinsekvon en nia Asocio!) Komitatkunsidon tie, de la 25-an ĝis la 27-an de januaro, 2001.



Speciale mi gratulas al S-roj Medrano Brunet, kiuj multe laboris kaj laboras pri

Mi ankaŭ kontaktis esperantistojn dum tre agrabla aranĝo kultura kaj informa.

Marta Alonso, Sekretariino pri Financoj

Kun ankoraŭ freŝa inko...




Aŭ pli ĝuste, kun ankoraŭ freŝaj elektronoj, ĉar oni ĵus eliris la mesaĝon el la komputilo, ni ricevis novaĵojn pri nia reprezentanto en la Brazila Esperanto-Kongreso, Marta Alonso.

Post pli ol 7-hora flugo, ŝi alteriĝis en Sankta-Paŭlo, kaj estis ricevita de James Rezende Piton. Laŭ ŝi, la urbego ja impresas: ĝi havas pli ol 11 milionojn da loĝantoj!

Antaŭ kaj post la Kongreso nia reprezentantino vojaĝoj al kelkaj urboj kaj prelegos kaj pri Kubo kaj pri la kuba esperanto-movado.

Jam de nun ni povas raporti, ke en Brazilo estas multe da intereso pri Kubo kaj Kuba Esperanto-Asocio...

La Redaktoro





9-a Nacia Seminario por Instruistoj!

Gvidata de la Sekretario pri Instruado, S-ro Héctor Jiménez, kaj helpe de S-ro Julián Hernández, eks-prezidanto de KEA, okazis de la 6-a ĝis la 9-a de julio la kutima Nacia Seminario por Instruistoj. La nacia sidejo de Kuba Esperanto-Asocio denove ricevis

Vendrede kaj sabate, de la 1-a ĝis la 4-a sesioj, oni ĝuis prezenton de praktikaj instruilecionoj flanke de la partoprenintoj, kun posta analizo kaj debato de la temoj.

Dum la 5-a sesio, ankaŭ vendrede, S-ro Jiménez analizis gramatikaj aspektoj de la lingvo.


La 6-a kaj 7-a sesioj, sub la gvido de S-ro Hernández, estis dediĉitaj al la metodologio de la esperanta lingvo-instruado.

La sabataj 5-a kaj 6-a sesioj, ankaŭ gvidataj de S-ro Hernández, tuŝis gramatikajn aspektojn de la lingvo, dum la 7-a kaj fina sesio estis dediĉita al ekzercado.

Korespondi deziras...

Samideano Kazimierz Doskocz (espero1@poczta.wp.pl), nova esperantisto, deziras korespondi kun samideanoj el la tuta mondo. Li multe ŝatas ŝakon, kaj kolektas telefonajn kartojn.

Jen lia adreso: Kazimierz Doskocz, ul. Sienkiewicza 330 SZCZYTNA, Polska, (Pollando).



16/4, PI-57-


Plia polo, 28-jarulo Zenon Pietrzykowski, deziras korespondadon kun kubaj virinoj. Li deziras scii pri nia kulturo, muziko kaj kantoj. Jen lia adreso:





Brigo: Kuba partopreno

Samideano Fernando Paredes, Havana gastigado, kunlaboris per hispanlingvaj terminoj de 6-lingva brigo-terminaro kompilita de S-ro eldonita de Aŭstralia Esperanto-Asocio en 1999.



fakdelegito pri kun la redaktado Ralph Harry, kaj

Yumeiho: kubanoj en la unua vico

Rekone al liaj meritoj, D-ro Masayuki Saionji nomumis al Francisco Briel Direktoron de Monda Yumeiho-Societo por Meza kaj Suda Ameriko kaj la Karibio. Samideanoj Francisco kaj Fráncel Briel lastatempe ricevis la 4-gradan diplomon de Yumeiho.

Nova redaktoro de La Noktuo

La nacia estrarano pri Kulturo, samideano Pedrito Fernández estos de nun la nova redaktoro de la trimonata informilo La Noktuo. Sukceson ni deziras al li!

La Girdilla parolas Esperanton!

La Girdilla, tiu simbolo de de Havano, fariĝis lastatempe ankaŭ simbolo de nova, kvarmonata bulteno, eldonata de la ĉefurbaj esperantistoj. Gratulon al ili!



LA GIRALLA ESPERANTISTA
ASOCIACION CUBANA DE ESPERANTO
AUSPICIAO POR LA DIRECTIVA PROVINCIAL
CIUDAD DE LA HABANA

COMENTARIO DEL REDACTOR

¡¡¡ A ZANENHOFF!!
después de conocer el Nuevo
trimestral de
... etcé

Mesaĝo el Japanio



(Jen kortuŝa mesaĝo el Japanio alveninta al nia redakcio. Bonvolu diskonigi ĝin, kaj informu al ni pri dezirantoj ricevi la revuon.)

Estimataj gesamideanoj,
Saluton!

Mi unuafoje skribas al vi. Mia nomo estas (s-ino) KATAOKA Yukiko, membro de Esperanto Societo en Takatuki en Japanio, redaktorino de Esperanta brajla revuo «La Fratoj». Mi ricevis vian ret-adreson de s-ro Orlando E. Raola, kiu estas esperantisto en via lando, kaj studadas en japana universitato, kiu venis al nia regula kunsido de Esperanto en la 11a de julio.

Mi eldonas persone Esperantan brajlan revuon de antaŭ du jaroj kaj sep monatoj por prezenti staton de nia lando al nevidantaj esperantistoj en ĉiuj landoj.

Ĝis nun mi eldonis 16 numeroj de la revuo, kaj nombro de la legantoj estas 89 personoj en 27 landoj, kiuj estas ĉefe en Europo.

Mi do serĉadas legantojn en aliaj regionoj. Mi deziras havi legantojn en via lando. Bonvolu plenumi mian deziron, mi elkore petas.

La revuo, eldonata en ĉiu dumonato, estas senpaga, modesta kaj amatora farajo, sed multaj legantoj skribis al mi sian impreson kun kontenteco.

Bonvolu doni al mi la nomon kaj adreson de nevidantaj esperantistoj en via lando. Se vi sciigos tion al mi, mi estus tre ĝoja.

Mi antaŭdankas vin sincere.

Atendante vian afablan respondon!

Sincere Via

KATAOKA Yukiko
10-10-218, Kosobe 2,
Takatuki, OOSAKA,
569-1115, Japanio

Tel./ Fak.: 81 (0)726 81 4747

Retadreso: fratoj@jan.email.ne.jp



Klopodu ne gliti!

Konsile

Ĉi tie mi ne parolos pri la poezia glito priskribita de Kalocsay, nek pri la glitabuloj uzataj de infanoj, nek pri la glitoj en la bankuvo.

Ankaŭ nia afero ne rilatos al eĉ pli timigaj langoglitoj, kiuj kelkfoje malkovras niajn plej intimajn pensojn, kaj ĝojigas niajn amikojn...

Mi celas tiujn glitojn, okazintaj de iom rapida kaj senzorga parolado, kiel okazas ĉiam, kiam oni deziras paroli pli rapide ol la propra lango...

Jen kelkaj perloj...

Klopodu ne diri

Temas pri afero nur porkomenca...

Infana reenkontiĝo...

Tre interesa poŝtaĵo...

Li flakenmetis la tutan aferon...

Mi nun monstros al Vi...

Trinki per unu gluteo...

Mi esploros la aferon...

La advokatoj diras, ke...

Jen refreŝigaĉo...

Vere mi laksas nun...

Anstataŭ la ĝusta

Temas pri afero nur porkomenca...

Infana renkontiĝo...

Tre interesa poŝtaĵo...

Li flankenmetis la tutan aferon...

Mi nun montros al Vi...

Trinki per unu gluto...

Mi esploros la aferon...

La advokatoj diras, ke...

Jen refreŝigaĵo...

Vere mi lacas nun...

Grumblulo



La Angulo de la Duboj

«Nu, ĉi tiu trinkaĵo estas ja bonega! Bonvolu, Molina - diris samideano dum sabata renkontiĝo - donu al mi alian glaseton!»

Tuj amiko Molina ŝanĝis la glason, kaj la petinto restis gape antaŭ li.

«Nu, kjo okazas? Ĉu ĝi ne bongustas? Sed vi ĵus diris...»

«Jes, mi petis alian glason!»

«Kaj mi ŝanĝis al Vi la glason. Mi ne scias, kial Vi tion deziras, sed mi faris...»


«Sed mi deziras alian! Mi eĉ pagis!»

Mi estis observanta ilin de ne tro malproksime, kaj diris al mi mem: prefere interveni, antaŭ ol estos pli da miskompreno ...

«Vidu, amik', okazas, ke Viu demandis alian, ne plian glaseton. Ĉe ni kubanoj ĝi estas estas ofta eraro. Se Vi estus demandinta plian, Vi estus jam ricevinta vian trinkaĵon.»

PIVulo

H
U
M
U
R
O



Nu, frato, pli bone ni lernu tiun Esperanton... aŭ ni malaperos samkiel la dinosaŭroj...

Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro

